# L E Ĝ P R O P O N O

# P O R

# U N U F L A N K A   M A L A R M I Ĝ O de F R A N C I O

*********************************************

Komitato por la Unuflanka Malarmiĝo

Kreita de Louis Lecoin

Komitatanoj :

Claude AUTANT-LARA
Luc BERIMONT
Pierre-Valentin BERTHIER
Georges BURGAT
Isabelle CABUT
François CAVANNA
Bernard CLAVEL
René CRUSE
René DUMONT
Doktoro G.FERDIERE
Suzanne FLON
Max-Pol FOUCHET
Jean GAUCHON
Jérôme GAUTHIER
Jean GOSS
Daniel GUETTE
Gisèle HALIMI
Robert JOSPIN
Alfred KASTLER
Maurice LAISANT
Pastro LELONG
Guy MARCHAND
Pierre MARTIN
Louis MOLLION
Théodore MONOD
Yves MONTAND
Maurice NADAUD
May PICQUERAY
Jean PIGNERO
Robert PROIX
Raymond RAGEAU
Henri ROSER
Jean ROSTAND
Simone SIGNORET
Georgie VIENNET

*********************************************

## ALVOKO AL LA PUBLIKA OPINIO

### I. La problemo de la armeo, sen mensogi...

La armeaj problemoj estas aktualaj : ĉiuj parolas pri ili kaj debatadas pri kreditoj, neĉesaj reformoj, novaj strategioj.

Nu, preskaŭ neniam oni ektraktas la veran, bazan problemon, kiu povas kondensiĝi per jenaj du demandoj :

- ĉu estas racie plu prediki la antikvan doktrinon : "Por havi pacon, ni preparu militon." ?
- ĉu la abolicio de la milito, la forigo de la armeoj ne havas unuaecan rajton (kio postulas kuraĝon kaj imagpovon) ?

Prepari militon por havi pacon (kio per modernaj vortoj nomiĝas malinstigo), tiu malnova proverbo estas hodiaŭ pli absurda ol iam ajn:

- la historio pruvegas, ke ĉiuj vetarmadoj alvenigis militon;
- ĉu dum la lastaj militoj la armeo protektis la ĉivilularon ? En 39-45, en Vjetnamio, ktp, la plimultaj viktimoj estis civiluloj, dum domoj, uzinoj, kampoj, arbaroj, estis detruitaj;
- en la epoko de hidrogenaj bomboj kaj kemiaj aŭ bakteriaj armiloj, la konsekvencoj de milito povas esti por ĉiam neripareblaj, kaj ilia amplekso superas la imagkapablon.

Mirige estas, ke antaŭ tiel alarma situacio la plimulto el la politikistoj silentadas. La konceptenda kritikado estas tiel profunda, ke ili preferas ĝin eviti, paralizataj aŭ blindigataj ĉu per la politika ambicio, la profitavido, ĉu per doktrinoj aŭ la postuloj de balotismo. Ofte ankaŭ, ilia silentado, aŭ ilia tradiciemo baziĝas sur motivoj malkonfeseblaj, sed tre realaj, nome la uzado de la armeo kiel trompvarbilo aŭ subpremilo.

Tamen ne mankas kleraj personoj (sciencistoj, filozofoj), kiuj alarmis, sed tiuj ne posedas la rimedojn por ekŝanĝigi la politikon kaj haltigi la kuradon al la milito.

La konsciiĝo kaj la interveno de la plimulto estas nepre necesaj; tial vin koncernas tiu alvoko.

## II. Novaj kaj realistaj proponoj

Abolicii la militon, forigi la armeojn. Jes, sed kiel ?

La ripeta malsukceso de la internaciaj konferencoj por malarmiĝo kaj la koncepto pri "ĝenerala, samtempa kaj kontrolata" malarmiĝo estas tute ne realistaj en la nuna stato de la aferoj, kaj tio instigu nin proponi aliajn solvojn.

Tial la Komitato por Malaperigo de la Militoj kaj la Pacista Unio proponas unuflankan malarmiĝon, tio estas, sen atendi la aliajn, ekmalarmi Francion.

Tio eblas hodiaŭ pro la rapideco kaj la amplekso de la informado, kiu trafas la koron mem de la plej fermitaj ŝtatoj. La informo pri tiu malarmiĝo naskus interesiĝon kaj entuziasmon - notinde ĉe la junularo - kiuj igus agresadon tre malfacila. Kiu registaro aŭdacus, antaŭ la mondo kaj antaŭ siaj propraj civitanoj, kredigi, ke senarmila popolo ĝin minacas ?

Tio eblas hodiaŭ, ĉar ni konas la efikon de la metodoj de neperforta rezistado *, por elvoki nur du freŝ-datajn ekzemplojn : oni vidis unu el la plej potencaj armeoj el la mondo en malfacila situacio dum pluraj tagoj, kiam la Ĉehoj spontane rezistadis per neperforto en '68; oni vidis unu el la plej potencaj trustoj usonaj retroiri, kaj poste cedi antaŭ la agado de la neperfortaj kamparaj laboristoj de Cesar Chavez.

Tio eblas fine pro la internacia amplekso de la pacismo, kaj laŭ tutmondisma vidpunkto, ĉar, hodiaŭ, neniu popolo povas plu vivi izole de la aliaj.

Tia estas la malinstiga forto, kiun ni proponas.

## III. Nia alvoko

La Komitato kaj la Pacista Unio petas vin :

- atente legi la leĝproponon kaj la klarigon de la motivoj;
- diskonigi tiujn dokumentojn ĉirkaŭ vi, kaj pli ĉefe al la elektitoj, la responsuloj pri partioj kaj sindikatoj, la edukistoj, la ĵurnalistoj, la reprezentantoj de eklezioj kaj filozofiaj kaj homamaj movadoj.

Ili fidas al vi por :

- interveni rekte ĉe ĉiuj politikaj responsuloj (paroladoj, leteroj...);
- konigi viajn kritikojn kaj sugestojn;
- krei lokajn grupojn por informi kaj agadi.

Komitato por Unuflanka Malarmiĝo,
kreita de Louis Lecoin,
kaj Unio Pacista de Francio.

adreso : 4 rue Lazare-Hoche,
F 92100 Boulogne

* Noto de la trad. : La pacista frakcio de SAT eldonis pri tiu temo la broŝurojn : "Ĉu armeo aŭ civila, neperforta defendo ?" (elĉerpita) kaj "Politika neperforto" (teksto de Movado por Alternativo Neperforta, ankoraŭ havebla) ĉe :
Cercle espérantiste de l'Agenais, F 47340 Laroque Timbaut.

## LEĜPROPONO POR UNUFLANKA MALARMIĜO DE FRANCIO

"Se estus pruvite al mi, ke per milito mia idealo havus perspektivojn por enkorpiĝi, mi tamen dirus ne al la milito. Ĉar oni ne starigas homecan socion sur amaso da kadavroj." Louis Lecoin.

### KLARIGO DE LA MOTIVOJ

Ĉiu iom informita persono hodiaù scias, ke la estonteco de la homaro estas grave endanĝerigata per multaj minacoj : superpopolizado, malsategoj, poluciado, militoj...

De kelkaj jaroj multiĝis la alarmkrioj; ni citu, inter multaj aliaj : "Atoma milito per akcidento" de Instituto Mershon (Ohio), "Pripensado ĉe la bordo de la abismo" de profesoro Georg Picht, "Kurado al la morto" de Profesoro Robin Clarke, "Kian teron ni lasos al niaj infanoj?" de Barry Commoner *, "Utopio aù morto" de René Dumont... Tiuj nuraj verkoj, pro la seriozeco de siaj verkintoj, sufiĉas por elvoki emociige la draman problemon de la postvivo de la homaro tuj antaù la 21a jarcento. "La mondo riskas detruadon antaù 20 ĝis 50 jaroj" deklaras Linus Pauling, Nobelpremiito pri fiziko kaj paco. Nu aperas klare, ke la tutmonda vetarmado (armiloj eksplodaj, fajrigaj, atomaj, bakteriaj, kemiaj... "klasikaj" aù malsimplaj) estas la plej grava plago. Ĝi reprezentas frenezan malŝparadon, multfoje denuncitan, antaù la urĝaj bezonoj de la subevoluintaj landoj, kaj eĉ se oni konsideras iujn ekonomie malfortajn soci-kategoriojn en nia propra lando.

La egaj rimedoj je homoj, energio, inteligento, krudaj materialoj nun investitaj en la laboratorioj de la militista esplorado, sur la manovrejoj aù en la armilejoj, por nura perdo, devas esti dediĉataj plejeble rapide al la savado de nia planedo kaj de ĝiaj loĝantoj. La duono el la inĝenieroj en la mondo laboras por la armilaroj, kaj pli ol 100 milionoj da homoj vivas per la militindustrioj.

Krome, ni ne povas forgesi la eventualan teknikan aù psikologian akcidenton, kiu riskas eksplodigi atoman militon. La multigado de la sekuriloj, per kiuj la fakuloj

------

* Noto de la trad.: mi tradukis la titolon de la franca titolo. La titolo de la originalo en angla lingvo estas : "Science and survival" (Scienco kaj postvivo).

senĉese dotas la mekanismojn kapablajn komencigi la katastrofon, montras okulfrape la maleblecon antaùgardi sin tute. Kaj eĉ se oni supozas, ke nia mondo povus daùrege eskapi el tia akcidento, la neevitebla finkonsekvenco de la vetarmado ne povas trankviligi niajn antaùtimojn : dum la historio, ĉiuj vetarmadoj kondukis al milito.

Tiel la homaro alvenis al decida momento en la ĉiuflanka pliigado de la kolektiva kaj leĝa perforto. Multaj estas niaj kuncivitanoj, kiuj ekkonscias pri tio. Kiel ili povus akcepti mondon kie, dum kirurgo realigas grandfarojn por savi homan vivon, bomboj kun nemalkovreblaj globetoj celas malkuraĝigi ĉian kirurgion ? Kiun ne kaptus vertiĝo aù kolero antaù tiaj kontraùdiroj ? La sinteno de la junuloj estas aparte signifa : multaj sentas la trudon de perarmila servo multe pli kiel absurdaĵo ol kiel sankta devo. Oni foje kredas klarigi la profundan malŝaton de la junuloj pri la armeo per ribelemo kontraù ĉia disciplino, tamen oni povis ĉeesti amasegajn junul-renkontiĝojn, kiuj okazis sen malordo. Kiam la disciplino de la armeo estas rifuzata, tio okazas unue, ĉar la ekzistokialo de la soldatservo estas sentata kiel neakceptebla.

La tutmonda danĝero estas tro granda, la krizo de la armeo tro okulfrapa, por ke oni povu ankoraù teni sin firme ĉe la malnova kredo "Si vis pacem para bellum" (latine : se vi volas pacon, pretigu militon). La situacio postulas ion alian ol paliativojn; ni bezonas hodiaù pruvi nian imagpovon kaj nian aùdacemon.

*

Francio povas kaj devas decidi iniciaton kapablan komencigi la tutmondan malarmiĝon. Sed kiel ?

La maniero, kiun ni proponas por atingi tiun celon, malsamas de la tradiciaj konferencoj pri malarmiĝo komencintaj fine de la antaùa jarcento kaj kiuj, de Hago ĝis Ĝenevo, de la Societo de Nacioj ĝis UNO, ĉiam finvenis al pikaj malsukcesoj. Malkapablo facile komprenebla en socio dediĉita al la naciaj egoismoj, al imperiismaj apetitoj, kie malfido kaj mensogo estas parto de la ludreguloj. Tiun "ludregulon" ni devas frakasi. Sed ni scias ankaù, ke la starigado de nova reĝimo, kiel ajn homeca ĝi estus, kaj eĉ se ĝi ampleksus la tutan mondon, ne gardus nin kontraù la vetarmado kaj la militdanĝero, se ĝi ne forigus la armeon.

Tio, kion ni proponas al la franca parlamento, al la franca popolo, ne havas precedenton en la historio de la grandaj nacioj, ĉar temas pri unuflanka malarmiĝo. Se tiu ideo ankoraŭ estigas mirkonsternon, ĝi vojiris ekde la tago, kiam Louis Lecoin iniciatis sian kampanjon, en 1967, por la unuflanka malarmiĝo de Francio. Sciencistoj, ekleziuloj, politikistoj, eĉ kelkaj armeanoj konsideras hodiaŭ tiun eblon kiel la nuran rimedon por rompi la cirklon de la monda perterora ekvilibro, kaj malfermi breĉon al malarmita homaro.

Tamen du gravaj kritikoj ĝenerale esprimiĝas kontraŭ tiu propono :

- ĉu nacio povas ekriski foroferi sin mem al eventualaj agresontoj ?
- la militindustrioj konsistigas konsiderindan branĉon de nia ekonomio kaj ebligas ekvilibri nian komercan bilancon.

Al la unua kritiko ni respondos, ke oni devas imagi la eksterordinaran eĥon, kiun havus ĉe internacia nivelo la ekscio pri la franca malarmiĝo, kun solena deklaracio instiganta la aliajn naciojn imiti ĝin, kaj la invito al ĉiuj ŝtatestroj, ĵurnalistoj kaj turistoj veni por konstati surloke la realecon de la malstarigado de niaj armeaj instalaĵoj kaj la detruadon de la armilstokoj. Oni povas pensi, ke tiaj eventoj kreus entuziasmo-ondon en la tuta mondo. Tiun malarmiĝon akompanos ĉiuj politikaj paŝoj celantaj starigi mondan federacion de la popoloj.

En tiaj kondiĉoj, registaro malfacile povus trovi pretekston por pravigi agreson (oni ĉiam atentas pri zorgema pravigo al ĉiuj agresadoj, notinde por subteni la kuraĝon de la armeo). La unuflanka malarmiĝo ne nur ne igus la landon pli atakebla, sed ĝi tre bone ludus malinstigan rolon, pli efikan ol la atoma frapforto.

Tiu malinstiga forto iĝus tute timinda se, en la tuta lando, disvolviĝus civitana spirito bazita sur la aktiva neperforto. Por multaj el niaj kuncivitanoj la neperforto, kaj ĝiaj eksterordinaraj ebloj, estas ankoraŭ malkovrendaj. Tiu leĝpropono estu ankaŭ instigo por starigi kaj praktiki la neperfortajn metodojn kaj teknikojn, kaj por krei grandan mondanistan movadon, kiu malfermos perspektivojn aliajn ol la tradiciaj militaj aliancoj.

Pri la dua kritiko, la jena leĝpropono donas al ĝi grandan lokon kaj antaŭvidas profesiŝanĝojn, reklasadojn kaj

monkompensojn. Certe, la problemo estas malsimpla kaj necesigas gravajn ŝanĝojn en nia ekonomio, sed ili povas realiĝi nur per la transdonado de la armeaj kreditoj disponebligitaj. Tiucelajn studadojn faris UNO ekde 1962.

*

Prezentante tiun leĝproponon, la Komitato por Unuflanka Malarmiĝo kaj Unio Pacista de Francio estas konvinkitaj, ke povas, devas, fariĝi realo tio, kio ankoraŭ hieraŭ estis utopio. La politikaj konceptoj kaj la internacia moralo timige malfruas kompare kun la sciencoj kaj teknikoj; la malarmiĝo ne restu pli longtempe inter la utopioj.

La Komitato por Unuflanka Malarmiĝo kaj Unio Pacista de Francio estas konvinkitaj, ke nia nacia malarmiĝo havos baldaŭ unuaecan rajton inter la problemoj de la nuna tempo, kaj ke tiu alvoko estos aŭdata de la elektitoj kaj de la tuta popolo, ĉar temas pri la sekureco, la monda paco kaj la savo de la homaro.

## L E Ĝ P R O P O N O

Pro la antaŭparolo de la franca konstitucio, kiu antaŭvidas "la organizadon kaj defendadon de la Paco", estas proponata jena leĝo :

Unua artikolo. - Francio plenumos kiel eble plej rapide la disigadon de ĉiuj siaj armeoj teraj, maraj kaj aeraj, kaj la detruadon aŭ transformadon de ĉiuj siaj armiloj kaj militiloj.

2a artikolo. - Ĉia fabrikado de armiloj estos malpermesata sur la tuta amplekso de la ŝtata teritorio, same kiel ĉia mortpreparado per ia ajn procedo (atoma, kemia, biologia, bakteria, klimata). Tiaj produktaĵoj ne povos transitpasi tra Francio.

3a artikolo. - La uzinoj, armilejoj kaj diversaj establejoj laborantaj por la armeoj, kaj eventuale por la milito, estos transformataj por fabriki ilojn kaj maŝinojn kun civila intereso, por alporti efikan helpon al la subevoluintaj landoj, post kiam la esencaj bezonoj de la nacia merkato estos kontentigitaj.

4a artikolo. - La senlaboro rezultonta momente el la transformdecidoj, kiuj sekvos la nunan leĝon, ne devos estigi

monperdojn por la salajruloj, kiujn koncernos tiu transformado. La tuta dungitaro laboranta en tiuj koncernataj uzinoj, armilejoj kaj diversaj establejoj, ĝuos, sen iu ajn interrompo, ĉiujn rajtojn kaj avantaĝojn, kiujn ĝi havis antaŭ la akcepto de tiu leĝo.
Dum la periodo de regulado de la transformado, ĉies salajroj estos prenataj el la iama buĝeto de la nacia defendo.

5a artikolo. - Parto el la iama buĝeto de la nacia defendo estos dediĉita al la plibonigo de la sorto de la plej malprivilegiitaj kategorioj de la landanaro, kaj poste al sektoroj kun plej urĝaj bezonoj, notinde lernejoj kaj malsanulejoj.

6a artikolo. - Post dedukto de la elspezoj antaŭviditaj en la artikoloj 4a kaj 5a, la cetero de la buĝeto de la armeoj estos dediĉita al la subevoluintaj landoj, per la sendado de iloro kaj kompetentaj laborantoj, sed eksklude de ĉia rekta helpmono, kaj tio dum la tempo necesa al ilia tuta restarigado.

7a artikolo. - Ĉiuj profesiaj armeanoj senigitaj je siaj oficoj pro la nuna leĝo ĝuos la aranĝojn de la artikolo 4a.

8a artikolo. - Francio permesos ĉian internacian kontrolon ebligantan konstati la aplikadon de la nuna leĝo.

9a artikolo. - La franca registaro estas komisiita por komenci, per ĉia ebla vojo, la procezon de federaciiĝo kun ĉiuj aliaj registaroj, kiuj elektus similan leĝon.

La Komitato por Unuflanka Malarmiĝo

*************************************************************

Eldonita de SAT-Broŝurservo/Laŭte! * Listo senpage ricevebla de Cercle espérantiste de l'Agenais, F 47340 Laroque Timbaut
Gérant & imprimeur : Baudé, 47340 Laroque.